


LA JUNA VIVO



MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.

ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

JUNULOJ ANTAŬ LA VIVO.

Estimata Redakcio,

Kiam mi, nova abonanto, unuafoje legis nian gazeton, mia koro eksaltis pro ĝojo. Fine mi trovis gejunulojn, kiuj „vivas”.

Mi kredas, ke mi devas klarigi miajn vortojn. Estante 18-jara licea studanto, mi havas multe da kunuloj, de kiuj mi ĉiam atendis signon de „juna vivo”, sed vane! Miaj kunuloj, kiuj aliflanke ne estas malbonaj, estas preskaŭ ĉiuj sur malbela strato.

Ili ja konfesas sporton, kiel unikan esprimon de la vivo. Se vi volas paroli kun ili, vi devas trakti pri piedpilko. Nun mi ne neas, ke sporto estas tre bona afero kaj fakte mi ekzercas kelkajn specojn, sed mi opinias ke la homo, kaj precipe la junulo, havas ne nur muskolojn, sed ankaŭ animon.

En mia vivo mi donas tiom al la korpo, kiom al la spirito. Tamen mi ne estas fenomeno; mi estas egala al aliaj junuloj. Kial ili ne faras kiel mi? Mi havas kelkajn kunulojn, kun kiuj mi povas interparoli. Sed kiam ni serioze diskutas problemojn, kiuj povus interesi ĉiujn junulojn, ni tuj estas mokataj. Certe tio malĝojigas nin.

Pro tio, legante en „La Juna Vivo”, ke ĉie en la mondo ankoraŭ ekzistas „vivanta” kaj „ne-vegetanta” junularo, mi rekomencis

esperi. Oni devas formi fortan junularon por la morgaŭa, libera mondo. Kaj Esperanto faros ĝin.

Mi petas, ke vi ankoraŭfoje preparolu, ĉar tiam mi kaj miaj torinaj samideanoj havos subtenilon en nia batalo por la „Vivo” de la gejunuloj.

VIVU LA VERDA STELO!

Roberto Codazza (Italujo).

CHOTT-EL-DJERID.

Malfermu vian atlason kaj, dum momento, rigardu la landkarton de Tunizio. Sur la orienta marbordo vi vidas en la regiono Sahel, la urbon Sousse. El Sousse iras fervojo, kiu diagonale trapasas Tunizion nordoriente-sudokcidenten kaj finiĝas en la oazo Tozeur.

Per la okuloj akompanu la fervojon. Preteriru Kairouan'on, urbon, faman pro siaj moskeoj kaj siaj lanaj tapiŝoj, kaj iru plu. Jen Sbeitla kun siaj romanaj ruinoj. Dekstre de la fervojo profiliĝas la impona silueto de Djebel-Chambi (la plej alta monto en Tunizio). Maldekstre vastiĝas ĝis la horizonto la unutona „alfa-mar”. Daŭrigu suden: Jen la urbetoj Moularès kaj Métlaoui, gravaj fosfataj minejoj. Inter la du urbetoj fluas brua rivereto en imponaj interkrutejoj. Ĝi estas la Ued-Seldja (arablinge: neĝa rivereto).

Nun, haltu en la vilaĝo Oulad-Majed, la fino de via imaga vojaĝo.

Kelkajn mejlojn de tie, oni povas vidi strangan pejzaĝon. Ĉu frosta lago? Ĉu ebenejo kovrita per kamforo? Ne! Estas la Chott-el-Djerid.

En Nordafriko oni nomas Chott (prononcu: ŝot) iajn lagojn, kiuj enhavas salitan akvon, kvankam ili ne interkomunikiĝas kun la maro.

La chott'oj estas ĝenerale malsupre de la mara nivelo. Tamen multaj chott'oj kuŝas ankaŭ en la alĝeriaj altmontplataĵoj.

Pro siaj dimensioj kaj sia stranga aspekto, la Chott-el-Djerid estas fama. La Chott-el-Djerid kaj ĝia najbaro, la Chott-el-Fedjadj formas akvejon preskaŭ 200 km longan. Tio estas sufiĉe impona por la eta Tunizio. Sed tio, kio impresas la ĵus venintan vojaĝanton, estas la tavolo da salo kaj da ŝlimo, kiu kovras tian vastegan lagon. La dikeco de tiu krusto varias laŭ la lokoj kaj laŭ la sezonoj.

Ekzistas vojoj sufiĉe firmaj, por ke karavanoj (kun pezegaj dromedaroj) povu sendanĝere pasi. Sed oni devas zorge laŭiri la piedpremitan vojon. Kelkajn paŝojn flanken kaj perfida fendego subite ekestos kaj fortiros la malprudentulon en ŝliman abismon.

Precipe dum la pluvsezono la akcidentoj estas multnombraj. La pluvo moligas la salan kruston kaj tiam eĉ la multe uzataj vojoj fariĝas danĝeraj.

La fama aŭtoro Jules Verne verkis novelon, kies temo estas Chott-el-Djerid. En „La Invado de la Maro” ni legas la aventurojn de kuraĝaj francoj, kiuj sukcesas fosi kanalon inter Mediteranea Maro kaj Chott-el-Djerid. Tiu riska projekto ekzistas reale. Antaŭ pluraj jaroj Majoro Roudaire konceptis planon de interna maro, kiu enhavis multajn meritojn: bonega influo je la klimato, kreado de novaj havenoj, ktp. Sed ĉio je malprofito de aro da urbetoj, kiuj estus submergataj.

Eble iam, Chott-el-Djerid fariĝos „Bahar-el-Djerid” (La maro de l' Djerid). Ĝis tiam ankoraŭ multaj dromedaroj kaj azenoj senglore pereos en salaj fendegoj.

André Secco (Megrine, Tunis, Afriko).

EKSKURSO AL LA MONTARO.

Belega matena krepusko eklumigis la montojn, kies pintoj levas siajn rokajn kapojn en senlima, ĉiela blueco. Ŝajnis al ni, kvazaŭ furiozinta maro en momento ŝtoniĝis. La sunaj radioj jam atingis la kapon de praavo Triglav, kiu estis kovrita de travidebla neĝa tuko. Ĝia norda muro rigardis nin per siaj rigidaj okuloj.

Post la adiaŭo en la kabano ni plirapidigis la paŝojn al la muro, kiu fariĝis ĉiam pli alta kaj bela en sia roka sovaĝeco.

Je la sesa horo ni atingis la muron kaj tuj ekgrimpis. Antaŭe mi iris, trans sufiĉe larĝan rokbreton, poste tra kanaletoj kaj supren laŭ longa fendo en la rokaro. Pli supre, kie la grimpadado kun ŝuoj sur la piedoj fariĝis malfacila, mi ŝanĝis ilin por grimppantofloj kaj miris ĉar Miĉo — mia kunulo — restis nudpieda. Li diris al mi, ke li al kutimiĝis al tio.

Estis ankoraŭ malbona, menciinda fakto: ni ne havis grimpsnuron. Ni ĝin petis en la kabano, sed oni ne havis unu.

„Povas! Devas povi!” diris Miĉo.

Certe, ankaŭ grimpanto kun ŝnuro, kiu grimpas antaŭe, riskas multe.

En la komenco nia grimpadado progresis sufiĉe rapide kaj ni estis fieraj, rigardante la horloĝon. En unu horo kaj duona ni atingis konatan, profundan kanaleton. Tio estis la signo, ke la duono de la muro jam estas sub ni! Tiu kanaletoj estis kovrita de neĝo kaj kvankam ni malfacile progresis, ni vigle babiladis pri alpinistoj, kiuj antaŭe transgrimpis la plej malfacilajn lokojn en tiu ĉi muro. Kiam

ni atingis larĝan rokbreton ni ĉirkaŭrigardis. — El la profundaj krutegaĵoj ekleviĝis blankaj, travideblaj nebuletoj. Ili fariĝis ĉiam pli grandaj, malrapide, sed konstante. Post kvaronhoro la pintoj ĉirkaŭ ni jam estis nevideblaj.

„Rapide!” diris Miĉo.

„Ĉu reen, aŭ flanken al la dekstraj rokoj, kaj de tie??” mi demandis.

„Antaŭen! Dekstren!” preskaŭ kriis Miĉo kaj liaj okuloj jam serĉadis la vojon inter la rokoj. Li komencis grimpi kaj mi tuj post li. Malhelaj nebuloj baldaŭ ĉirkaŭis nin kaj ekpluvis, ĉiam pli ege.

De ie alvenis eĥo de homaj voĉoj. Amikoj el la kabano vokis nin kaj tio donis al ni novajn fortojn por daŭrigi la grimpadon.

Ni grimpis trans malsekaj rokoj, malfacile serĉante la vojon tra la nebulo. Duonhoron ni rampis sur ege mallarĝa rokbreteto kaj poste staris supre, sub la nigra muro, kiu supren kaj malsupren perdiĝas en griza, nebula nenio. Tio estas la muro sub la pinto de Triglavo. Ĝi estis malfacila, sed alian vojon ni tiam ne povis elekti. La vento ekblovis kaj jetis la pluvon kontraŭ la muron. Ni rigardis la vojon por reiri, sed estis eĉ pli danĝere ol iri antaŭen.

Vertikale en la kruta muro. Komence ni kredis ke estos tute neeble grimpi sur ĝin, sed paŝon post paŝo ni malproksimiĝis de la rokbreto. La dorsosakoj malhelpis nin. Sur la rokoj estis ĉiam pli da neĝo, kiu ankaŭ malhelpis nin. La muro fariĝis ĉiam pli glata kaj malseka. — De ie la vento alportis homajn voĉojn. Ni ne komprenis la vortojn. Eble iu bezonas helpon?

„Mi vere opiniis, ke tiu flanko de la muro ne estos tiom malfacila” parolis Miĉo al si mem. Sed spite al tio li restis ĝoja kaj daŭre grimpis, ĉiam pli malrapide, serĉante la taŭgajn lokojn por la piedoj. Lia vizaĝo restis trankvila kaj, ŝajnis al mi, ankaŭ fiera. Baldaŭ ne plu estis eble daŭrigi la grimpadon sur la muro. Ni iris dekstren en la rokaron kaj malrapide transiris de breto al breto. Super ni la vento faris malgrandan fenestron en la nebulo kaj ni ekvidis parteton de hela, blua ĉielo. Sube de ni, en la malhela, griza profundeco perdiĝis la abismoj kiel malsataj buŝegoj de gigantoj.

Poste ni atingis la rokobreton kiu ŝajnis al mi la lasta antaŭ la supra rando de la muro. Kiel antaŭen? Antaŭ ni estis eĉ pli glata muro kaj apud ĝi estis grandaj rokoj, kvazaŭ turo sur glata ŝtonaro.

Ni tamen ekgrimpis. La ĉiela fenestro malaperis kaj nigraj nuboj denove ĉirkaŭis nin. Regis terura silento. La situacio estis serioza kiam ni atingis la pinton de la danĝera turo kaj denove komencis grimpi sur la muron

Ofte okazas ke eĉ tre bonaj kamaradoj en tiaj momentoj koleras unu kontraŭ la alia, sed inter Miĉo kaj mi tio ne okazis. Trankvile ni rigardis la neagrablan kaj danĝeran situacion. Pri morto ni ne pensis, tamen ni bone sciis, ke ĝi estas tre apuda. Ni grimpis 10 minutojn, 20 minutojn, duonhoron, iom dekstren en la rokaron, sed la rando ankoraŭ ne estis videbla. Ĉu nia direkto estas la ĝusta?

Ni ekstaris, rigardante ĉirkaŭ ni por serĉi signojn. En la silento ni aŭdas mallaŭtajn voĉojn, kiuj venas el tute alia direkto. Ĉu tio signifas, ke ni maltrafis la ĝustan direkton?!

Returne! Returne laŭ la glata, kruta rokbreto. Nur unu malĝustan paŝon, momenton da malpacienco kaj oni povas forgliti en la grizan profundecon. Returne, kvankam estis preskaŭ neeble. Meze de kanaletoj, kiun ni atingis post dek minutoj, ni haltis por serĉi la novan direkton

„Ho, mi pensis pri mia vivo”, ekparolis Miĉo. „Kiel eblas ke oni en kelkaj momentoj povas vidi sian tutan vivon? En parto de momento — tie sur la lasta rokbreto, mia tuta vivo glitis preter miaj okuloj, ĉion mi rememoris, eĉ la plej negravajn okazaĵojn”

Plu li ne parolis. Ni silentis kaj ni rigardis unu la alian en la okulojn, dum ni sidis kelkajn minutojn sur la rokoj.

Nova atako komencis.

Daŭrigota

K. Drago, Ljubljana, Jugoslavujo.

TRE GRAVA INFORMO.

Dum la lastaj jaroj „La Juna Vivo” enhavis tri partojn: unu ĝeneralan parton, kaj partojn speciale por lernejoj kaj por ĝeinstruistoj.

Ni faris tion, en interkonsento kun la eldonisto de LJV, por ke la abonantaro estu kiom eble plej granda kaj sekve la kotizo povu resti malalta.

Sed dume la paperprezoj kaj kostoj de presado ĉiam plialtiĝis kaj nur dank’ al la grave financa helpo de s-ro Muusses, la eldonisto, LJV ĝis nun aperis en sia kutima formato kaj ĝia kotizo ne ŝanĝiĝis. Tamen nun la malprofito fariĝis tiom granda, ke li ne plu povas daŭrigi la eldonon.

S-ro Muusses nun proponas jenon: Li eldonos gazeton, nur por lernejoj kaj ĝeinstruistoj. T.J.O. mem eldonu la gazeton „La Juna Vivo”.

Certe tiu propono havas avantaĝojn kaj malavantaĝojn, kiujn ni serioze pripensu.

Ofte la junularo (kaj ankaŭ la plenaĝuloj) plendis pri la infanca parto de LJV kaj multajn ankaŭ la instruista rubriko tute ne interesis. Ili do certe ĝojos, ke tiuj partoj malaperos el nia organo.

Tamen — malavantaĝo estas, ke — almenaŭ provizore — LJV estos malpli ampleksa kaj tamen kostos pli. Se T.J.O. mem devos presigi LJVn, pagi la interŝanĝekzemplerojn, specimenojn, ekspedadon kaj afrankadon, la kotizo nepre devos esti 3.— guld. jare (vidu la koncernan liston en ĉi tiu numero).

Esperable ĉiuj niaj legantoj komprenos la neceson de tio kaj restos fidelaj al nia gazeto. Kaj memoru bone: Ju pli da abonantoj, des pli bona estos la gazeto!

Ĝis nun la administra jaro iris de julio ĝis julio. Ĉar la propono por aperigi du gazetojn venas iom neatendite kaj estas sufiĉe grava, ni decidis pritrakti la aferon dum la IJK en Haarlem kaj en la instruistaj kunvenoj dum la Universala Kongreso en München kaj tial la nova plano efektiviĝos nur en septembro.

De tiam do aperos du gazetoj, tute apartaj. La T.J.O.-anoj ricevos „LJV” en nova formato. Ĉar ni ne precize scias, kiuj el niaj abonantoj estas geinstruistoj, ili ricevos en septembro specimenojn de ambaŭ gazetoj. Por glate funkciigi nian administradon ili tuj post la ricevo bonvolu sciigi, ĉu ili elektas la instruistan organon (kune kun la dukolora infangazeto), ĉu „La Juna Vivo”n, ĉu ambaŭ organojn. La infanoj ricevos la infangazeton, eldonotan de s-ro Muusses.

Ĉar de nun la administra jaro iros de septembro ĝis septembro, ni afable petas tiujn, kies abono finiĝis je la 1-a de julio, ke ili, kune kun la kotizo por la nova jaro, aldonu 0,25 guld. (aŭ egalvaloron) por la julia/aŭgusta numero.

I.L.E.I.-RUBRIKO.

(Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Ned. Centra Informejo: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).

Daŭrigo de la artikolo de k-o Pfützte.

1-a leciono: Montrante sur la landkarto Japanujon mi demandis: „Kio estas tio?” kaj donis mem la respondon: „Tio estas Japanlando”. La klaso ripetis kelkfoje la demandon kaj respondon. Infanoj unuope demandis kaj la klaso aŭ alia infano respondis. La samo okazis je bildo, japano, japanino, pupo.

Post tia leciono de 30 minutoj mi demandis germanlingve: „Kiu eltrovis ion interesan?”

La raporto montras la regulojn, kiujn la infanoj mem estis trovintaj. La akcent-regulon ili menciis

laste, post ripeta komparo. Ne mirige, ke infanoj post 6-jara lernado kaj bone konante la germanajn lingvo-regulojn, rapide konstatis la gramatikajn novaĵojn. Krome la infanoj, escepte de 2 infanoj, lernis dum 2 jaroj la anglan lingvon.

2-a leciono: Kie? — Adverba komplemento montranta lokon. Serioj de demandoj kaj respondoj: kio, kia kie.


Por havi pli bonan kontrolon pri la ekkonoj de la infanoj, mi donis skriban taskon. Antaŭe mi skribis la konatajn vortojn laŭ vortklasoj sur la tabulon.

Unua, mallonga tasko: La infanoj devis traduki 6 germanlingvajn frazojn, kiujn mi diris nur unufoje, en esperanto. Krome mi diris 5 nekonatajn Esperanto-vortojn. La infanoj havis la taskon serĉi la vortklason (substantivo, ktp).

Tasko 12: Germanlingve: kio estas kokino, se kokviro estas „koko”.

Sur la kvara paĝo de mia raporto mi skribis detale pri la plej oftaj eraroj: La infanoj tre ĝuste aplikis la adjektivojn „bela” kaj „interesa” en la formo de atributo. Sed jen malfacilaĵo je la vorto „japanisch”. 15 el 42 infanoj erare uzis la vortojn japano aŭ japanino. Kelkaj trovis la formojn: japantemplo, japanknabino.

En la vortformado, helpe de „in”, nepriparolita, 26 infanoj ne kapablis trovi la solvon. 16 formis ekzemple instruistonino el la donita vorto instruisto. Same



kokino. La observoj estas interesaj por personoj kiuj konas la germanan lingvon.

Je la difino de la vortoj laŭ vortklasoj la substantivoj, adjektivoj kaj verboj ne faris malfacilaĵon. La demandvorton kaj la prepoziciojn multaj infanoj ne ekkonis.

3-a leciono: Malgranda ripeto montris, ke la infanoj pli vigle partoprenis la demandadon kaj respondadon konante nun la metodon de mia instruado kaj la apartecon de Esperanto. Temo: numeraloj kaj pluralo. Pri la bazaj numeraloj mi parolis germane, intence ne uzante post la uzo de unu, du, tri, la direktan metodon. La infanoj mem serĉis la Esperanto-vortojn, helpe de „fremdvortoj” en la germana lingvo. Ekzemple monataj nomoj: September, Oktober, Dekade, Zentimeter, Millimeter.

La plus- kaj minustaskoj estis relative facilaj.

Sekvis la dua skriba tasko: La metodo estis la sama kiel en la unua tasko.

Observoj: malgraŭ la malfacileco 16 infanoj trovis la solvon por la pluralo de adjektivoj en la predikato. La germana kaj angla lingvoj ja ne konas tion. (Frazo 9: La japanaj bildoj estas belaj).

La kalkulaj taskoj treege ĝojigis la infanojn, kiuj miris ke ili povas lerni la bazajn numeralojn de unu ĝis mil en 20 minutoj.

La 4-a leciono: Direkta metodo helpe de landkarto.

Observoj: Infanoj, malbonaj en Esperanto, ĝenerale malsukcesis ankaŭ en la angla lingvo. El 42 infanoj 12 ne sukcesis dum la „elekto”. Tiuj 12 estis ĉiuj malbonaj en Esperanto.

La pli bonaj notoj de la knabinoj kaŭziĝis pro la pli rapida evoluprogreso ĉe knabinoj kaj due pro la fakto ke la plej multaj knaboj el Büsum kaj ĉirkaŭaĵo anoncis sin por la elekto de la „supera lernejo” (Oberschule).

Estas konstatande, ke ĉe kelkaj infanoj la observado de la komisiono dum la Esperanto-lecionoj faciligis la ĝeneralan prijuĝon.

Knabino, ĝis nun ne partopreninta la anglan lingvo-instruadon, sukcesis, ĉar ŝi pruvis en Esperanto sian lingvan penskapablecon. Kaj la komisiono havis la opinion, ke ŝi facile atingos la samklasanojn ankaŭ en la „angla lingvo”.

Resume oni povas konstati, ke la eksperimento — alparoli la ekzamenatajn infanojn per Esperanto — bone sukcesis. Tio estis la opinio ankaŭ de la aliaj membroj de la „elekto-komisiono”.

La observoj dum la lecionoj montras, ke meztalentaj infanoj kapablas dum mallonga leciona tempo superrigardi relative grandan kvanton da Esperanto-lingvaĵoj kaj kapablas trapensi ĝin. Ili do povis pruvi sian penskapablecon en pli multaj okazoj ol tio eblis ĉe la uzo de aliaj fremdaj lingvoj, plenaj je ortografiaj kaj fonetikaj malfacilaĵoj kaj plenaj je multnombraj esceptoj.

La infanoj serĉis kun ĝojo de esploristoj la lingvo-leĝojn de Esperanto, fervore aplikante siajn gramatikajn sciojn kaj ĝojis pri la libereco de Esperanto rilate al vortformado kaj sintakso. Krome la serĉado de „fremdvortoj” kaj parencaj vortoj en la germana lingvo, similaj al la Esperanto-formoj, montris al la komisiono la „lingvoriĉecon” de la infanoj.

La komisiono havis la impreson, ke la infanoj sentis Esperanton kiel belsonan, vivantan lingvon kaj ke la belsoneco eĉ influis favore ilian parolmanieron.

Richard Pfüzte, Mittelschule Nordseebad Büsum, Germanujo.

Raporto: En la popolaltlernejo Hustedt, proksime de Celle, en Malsupra Sakso, okazis de 26/3-2/4 '51 la dua porinstruista kurso. Estis bona rondo de ge-

instruistoj, kiuj en harmonio komencis lerni laŭ la Cseh-metodo aŭ pliperfektigis sin. La estro de la tuta laboro estis nia samideano H. Müller, Lehrte.

La Kulturministro mone subvenciis, la radio aranĝis elsendon.

Aŭtune okazos en Hannover la dua ekzameno por geinstruistoj. Jam nun en kelkaj lernejoj de Hannover, Braunschweig kaj Wilhelmshaven kelkaj geinstruistoj instruas Esperanton kiel liberan fakon.

Kio ĝi estas?

(Du provoj de la konkurso en la januara numero).

I. Ĝi estas tre interesa. Ni ricevas unu ĉiun monaton. Per ĝi mi havas informon kaj amuzon. Mi havas multajn. Ĝi estas por knaboj kaj knabinoj. Ĝi ĉiam havas bildojn. Geknaboj en la tuta mondo ricevas ĝin. Ĝi estas farita el papero.

Roberto Fraser (11-jara), Kirkcaldy, Fife, Skotlando.

II. Mi iras al ĝi. En ĝi mi lernas pri tre interesaj temoj. Ĝi havas piedpilk-klubon. Ĝi havas multajn ĉambrojn. Ĝi estas tre granda konstruaĵo. En la ĉambroj estas knaboj. Ĝi havas tre grandan korton.

Peter Heyhoe, Elliston Sec. County School, Cleethorpes, Anglujo.

Ĉe la bestmontrejo.

Hieraŭ mi vizitis la bestmontrejon de la cirko.

Simio gruntis. Mi ĝin tuŝis. Ĝi saltis sur mian ŝultron kaj mordetis min.

Giganta testudo manĝis herbon. Mi aŭdis terurajn blekojn. Tion faris unu leono kaj kvar leoninoj en kaĝo.

Du aproj ronkis.

La dresisto venis kaj purigis iliajn kaĝojn.

(Verkita laŭ la Freinetmetodo) Galtier (9-jara), Francujo.

Ludo (Kaptu feron, kaptu lignon).

La ludantoj staras en la mezo de la ludejo aŭ ĉambro. La gvidanto ordonas kaj oni kiom eble plej baldaŭ plenumu la ordonojn.

La nomoj de la tri lastaj aŭ plej malrapidaj ĉiam estas notataj. Se ies nomo trifoje estas notita, li ne plu rajtas kunludi.

La ordonoj ekzemple estas: „Kaptu feron!” Ĉiu kiom eble plej baldaŭ klopodu tuŝi ion el fero. „Kaptu lignon, kaptu vitron, tenu la piedojn de la tero, ekstaru sur la tapiŝon” ktp.

Prefere la grupoj estu malgrandaj, ekz. 7 personoj.

Esperanto-Lando.

Mia vojaĝo en la lando de Esperanto komenciĝis en iu sabato posttagmeze, kiam mia patro portis al mi lernolibretojn.

Mi estis en hospitalo kaj deziris flankokupon, por pasigi la tempon. Mi estis entuziasma pri la interesa eltrovo. Per ĝi la tuta homaro estos fratoj. En la tuta mondo oni trovas fratecon inter popoloj de multaj landoj kaj koloroj, ĉar tie ne ekzistas kolora baro.

Malantaŭ la verda standardo estas semistoj, malriĉuloj, laboristoj, ŝipkapitanoj, ktp. Ankaŭ Ĥinoj, Hindoj, Nederlandanoj, Angloj, Rusoj ktp.

Homoj de granda idealo, kiuj portas nian verdan stelon, volas nun kaj ĉiam trovi amikecon, do tial volas vojaĝi en la lando de Esperanto.

Verkajo de lernanto Arthur Battersby, Anglujo.

Sezonoj en Britujo.

Printempo.

Ĉiu ĝojas pri printempaj horoj,
Pri la birdoj kaj la belaj floroj.
Sed, ĉu volas iu homo iam,
Ke printempaj tagoj restu ĉiam?

Somero.

Se la sun' brilegas en somero
Super ies parto de la tero,
Ĉu deziras tiu homo tiam
Ke someraj tagoj restu ĉiam?

Aŭtuno.

En aŭtuno, fruktoj, greno, pomoj
Kaj legomoj plaĉas al la homoj.
Sed, ĉu volas iu homo iam,
Ke aŭtunaj tagoj restu ĉiam?

Vintro.

Belo estas en la prujnaj formoj
Kaj muziko en la vintraj ŝtormoj.
Sed ĉu volas iu homo iam,
Ke la vintraj tagoj restu ĉiam?

Nenjo Rimanto (Anglujo) (Kopirajto rezervita).

Ŝarado.

La unua estas persona pronomo.

La dua estas meblo, kiun nokte uzas la sanuloj, tage kaj nokte la malsanuloj.

La tuto estas abomeninda afero, kiu tro ofte malfeliĉigas la mondon.

(La solvon vi trovas aliloke).

L. Chasseriaud, Royan, Francujo.

La bona lernanto.

Peĉjo malfruis en la lernejo.

„Kio okazis, knabo?” demandis la instruisto. „Kial vi tiom malfruas?”

„Ho, sinjoro instruisto”, spirĝemas la knabo, „mi tiom rapidegis, ke mi eĉ forgesis pripensi iun elturniĝon.”

Vera okazintaĵo.

Budapeŝta patrino rakontis, ke la eta Sonjo, kiu vizitas nun la unuan klason, hejme ofte plendis, ke malbonaj infanoj batis ŝin.

La patro instruis ŝin jene: „Vi neniam komencu interbatadon, sed se iu donas al vi frapon, redonu ĝin.”

Post kelkaj tagoj Sonjo denove plendis, ke oni vangofrapis ŝin.

„Kaj ĉu vi redonis ĝin?” demandis la patro.

„Ne, ĝi estas ankoraŭ ĉe mi.”

El hungara revuo, P. B.

Joĉjo, kie vi loĝas? (Portretoj el Malsanulejo).

„Joĉjo, ho, nun mi ree forgesis, kie vi loĝas?”

„Ĉe la ĉevalfoirejo”, riproĉa rigardo punas la stultetan flegistinon. Tiu rigardo ŝajnas diri: „Homo, ĉu vi neniam memoros? Kiom ofte mi jam rakontis tion al vi!” Sed flegistinoj ofte estas tre nekomprenemaj.

„Kiel oni iras tien?” mi demandas plu.

Joĉjo senpacience skuas la ŝultrojn.

„Nu, simple. Oni eniras tiun straton, ĉu, kaj tiam laŭ la angulo kaj tiam tiel kaj tiam denove angulo kaj tiam preter tiu objekto kaj tiam vi estas ĉe la ĉevalfoirejo!”

Dum la klarigo li multe svingas la brakojn kaj li uzas ĉiujn siajn fingretojn. Image li nun certe iras tra la konata kvartalo, preter „tiu objekto”, por kiu li ne scias pli detalan nomon. Eble ĝi estas reklamtabulo aŭ ujo por malpurajoj.

„Do, tiel oni iras al la ĉevalfoirejo”, mi diris.

Li subite klinas sin super siaj kuboj kaj diras mallonge: „Jes.” Tio signifas: Nun sufiĉas. Foriru.

Joĉo estas ĉarma bubeto. Li parolas aŭtentikan amsterdaman dialekton kaj pri ĉio li havas trafan respondon. Li venis al la malsanulejo, ĉar la kuracisto devis forpreni liajn tonsilojn. La unuaj tagoj estis malfacilaj por li.

„Mia patrino venu!” li postulis kaj multe ploris, kiam ni helpis lin. Sed kiam lia patrino venis, dum la vizithoro, li faris indiferente kaj preskaŭ ne atentis ŝin. Poste tamen, kiam ŝi estis for, li ploris kaj mordis en la kuseno. Tamen ne daŭris longe. Per siaj akraj okuletoj li observis ĉion kaj ofte surprizis nin per neatenditaj rimarkoj.

Plej rava li estas, kiam li klopodas klarigi, kie li loĝas.

„Ankoraŭ unufoje mi klarigos ĝin al vi!” li diras minace. Kaj jen li ree komencas gesti: „En tiun straton, tiam la angulo kaj tiam ...” Iom suspekta li rigardas al niaj seriozaj vizaĝoj.

„Kaj tiam en la alian straton kaj tiam — al du flankoj ...”

Ho jes, kial ne eta ŝanĝo? Ni restas tute seriozaj.

Poste ni venas al Joĉjo kun la ĉefflegistino, kaj ŝi demandas:

„Diru, Joĉjo, kie vi loĝas?”

Joĉjo malafable rigardas ŝin. — Denove tia virino!

„Ne stias!” li diras kolerete.

„He Joĉjo”, mi flatas, „vi ja tiel bone scias tion!”

Senrezulte. Li nur kapneas.

„Sur la ĉe” mi klopodas helpi lin. Sed —

„Ne scias!” persistas Joĉjo.

„Ĉu mi divenu?” komencas la ĉefflegistino, „ĉe la Ĉevalfoirejo.”

Sed Joĉjo ne lasas kapti sin.

„Ne!” li diras laŭte. Kaj tiam, triumfe, „Ni transloĝiĝis!”

Nur pene ni restas seriozaj. Tia diableto!

„Kien do, Joĉjo? Kiel oni iras tien?” mi demandas.

Sed denove li superruzas nin.

„Ne scias. Mi ja kuŝas en la malsanulejo!”

Ni silentas. Tiom da logiko ni ne povas venki.

Tiam la ĉefflegistino ekhavas ideon.

„Bedaŭrinde”, ŝi diras, „nun mi ne povas skribi al lia patrino, ke ŝi morgaŭ povos veni por hejmenporti Joĉjon”.

Mi ne scias, ĉu tiu rimarko estis la kaŭzo, sed la humoro de Joĉjo tuj pliboniĝas. Poste li eĉ propravole rakontas, ke li loĝas ĉe la Ĉevalfoirejo. Sed tiam mi interrompas lin.

„Diru, Joĉjo, kio nun pri tiu transloĝiĝo?”

Momenton li rigardas konfuze, tiam li klarigas facile: „Ho, ni revenis!”

Mi vidas en ĉiu homo nur homon kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ liaj persona valoro kaj agoj.

D-ro Zamenhof.

Esperanto-poŝmarkoj.

Ĝis nun aperis 17 esperanto-poŝmarkoj, en kvar landoj (Aŭstrujo, Brazilo, Bulgarujo kaj Sovetio).

Oni povas dividi tiujn poŝmarkojn en du specojn: poŝmarkoj kun esperantlingva teksto kaj memorigaj poŝmarkoj, eldonitaj okaze de kongreso k.t.p.

Al la unua grupo apartenas kelkaj poŝmarkoj, kiujn eldonis la Poŝto de Brazilo kaj Sovetio.

En Brazilo la memoriga p.m. de la „Oka Specimena Foiro de Rio de Janeiro” (1935-a) portis tiun tekston en la portugala kaj esperanta lingvoj. Same la p.m. de la 9-a specimena foiro, en 1936-a.

Tiuj du p.m. montras la valoron de 200 rejsoj. La unua estas blua, la dua ruĝa.

En Sovetio jam en 1925-a aperis memorigaj poŝmarkoj kun esperanta teksto, memore al la elektristo Povov. (7 kop., blua kaj 14 k., malhelverda). La unua ricevis en 1928-a novan surpreron kun nova valoro de 8 kopekoj. En 1929-a du altvaloraj poŝmarkoj portis esp. tekston: 1 rubla p.m., kun bildo de la Centra Telegrafo en Moskvo, kaj 3-rubla p.m. „Volhov”, je la nomo de Lenin.

La poŝmarkoj, kiuj aperis memore al Esperanto, estas jenaj: En 1927-a du p.m. en USSR (7- kaj 14-kopekaj) okaze de la VI-a Internacia Proletara Kongreso de SAT, en Leningrad. La sekvin-tan jaron la 7-kopeka p.m. ricevis nigran surpreron kun nova valoro de 8 kop. Ankaŭ en 1927-a tre bela p.m. montris la portreton de d-ro Zamenhof kun la kvinpinta stelo kaj la vorto „Esperanto”. Ĝi memorigas la 40-jaran jubileon de la internacia lingvo.

Dek jarojn poste aperis en Brazilo verdkolora p.m. (300 rejsa) Ĝi montras terglobojn kun la subskribo „Ora Jubileo de Esperanto”.

En 1936-a, okaze de la Naŭa Brazila Kongreso de Esperanto oni eldonis kvadratan p.m. (verdan, 300-rejsan). Ĝi montras la verdan stelon kun naciaj flagoj.

La Dekan Brazilan Kongreson en Rio de Janeiro (1945-a) oni memorigis per du p.m. La unua (40 ct., verda) montras virinon kun stelo, kiu verŝas radiojn sur Bulgarujon, videblan sur terglobo. La dua, speciale por la aera poŝto, kun valoro de 1,20 Cr., montras, kiel la rusa, portreton de la Majstro.

La lastaj poŝmarkoj estas tiu de Bulgarujo (1947-a), kiu montras la vorton „Esperanto” kaj verdan stelon sur geografia karto de Bulgarujo (prezo 20 + 10 lei) kaj tiu de Aŭstrujo. Ĝi aperis

antaŭ du jaroj (prezo 20 Gr.) kaj certe nun ĉiu esperantista filatelisto posedas ĝin. Pro sia simpla beleco ĝi ricevis la aprobon kaj laŭdon de la tuta Esperantistaro.

Michel Duc, Parizo, Francujo.



Ni diras al vi bonvenon en la 7-a Internacia Junular-kunveno en Haarlem, Nederlando.

Dume ĉiu, kiu ensendis sian aliĝilon ricevis lastan informon pri la alveno. Do, ĝis la 26-a de julio! Partoprenontoj en la postkunveno en „De Rading” nepre ne forgesu kunporti littukojn, lankovrilojn, ktp. (Vidu la antaŭan numeron.)

Dum la 7-a IJK la poŝta adreso estos: 7-a Internacia Junular-Kunveno ESPERANTO, Haarlem, Ned.

Leteroj, kiuj alvenos post la 2-a de aŭg. ne povos esti resendataj.

T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretariino: *Helmi Veldhuyzen, Hoŭ v. Delftlaan 79, Delft, Nederlando*).

Dank' al la afabla kunlaboro de la junlarsekcio de Svisa Esperanto-Societo, ni havas nun ĉesperanton ankaŭ en Svisujo: S-ro E. Keller, Kleinalbis 59, Zŭrich 45, Svisujo.

Ni deziras al li sukcesplenan laboron!

Ĉar s-ro Ballesteros transloĝiĝis de Hispanujo al Maroko, li ne plu funkcios kiel ĉesperanto. Ni dankas al li pro la kunlaboro, kiun li donis al ni. Lian taskon transprenos s-ro Montserrat (Provenza 75, Barcelona).


Ni kore bonvenigas lin.



Tagordo de la ĝenerala membrakunveno dum la 7-a IJK en Haarlem. (Tago kaj horo estos anoncataj dumkongrese): 1. Malfermo. 2. Jarraporto de la kasisto. 3. Jarraporto de la sekretario. 4. Ŝanĝo de la regularo. 5. Estrarŝanĝo. 6. „La Juna Vivo”. 7. Envenintaj proponoj. 8. Eventuale aliaj temoj, aludotaj de la ĉeestantaro. 9. Fermo.

Klarigoj: ĉe punktoj 2 kaj 3: La raporto estas por interesatoj senpage haveblaj ĉe la sekretario. Ĉe 4: La estraro proponas: Ŝanĝi en artikolo 6: a. La estraro konsistas el 6 personoj: prezidanto, sekretario, kasisto, redaktoro kaj du asesoroj. — b. Ŝanĝi art. 8: La administra jaro daŭras de la 1-a de septembro ĝis la 31-a de aŭgusto. — c. ŝanĝi art. 13. Ĉe 5: Eksiĝas: C. Geurts, prez. (neelektebla), G. Timmerman, kasisto, Elly Beekman, Aris Blauw, P. Slagt, asesoroj (neelekteblaj). Ĉe 6: Legu ankaŭ la koncernan artikolon en ĉi tiu numero.

SKOLTA RUBRIKO.



Vojaĝonte al la jamboreo. Dum ĉiuj tempoj Aŭstrujo estis ponto inter pluraj landoj. Kvantkam ĝi komence estis parto de la germana imperio, Aŭstrujo fariĝis sendependa lando, dank' al la latinaj kaj slavaj popoloj. Aŭstrujo ne estas nur unu lando, sed ĝi estas federacio de naŭ provincoj, kiuj ĉiuj havas siajn tradiciojn.

La aŭstra skoltismo enhavas naŭ provincajn asociojn, kies estroj estas la provincaj komisaroj.

La ĉefurbo Vieno havas 1.800.000 enloĝantojn.

Multaj turistoj vizitas la regionon de Salzkammergut, kie la jamboreo okazos. Certe la skoltoj tre ŝatos ĝin!

J. Guillon.

Propaganda agado en skoltaj medioj. Ni ĉiuj sentas la neceson de internacia lingvo por skoltoj. Tial ni lernis Esperanton kaj ni volas ĝin disvastigi. Ni ne forgesu, ke nia propagando taŭgas nur, se ni konsideras Esperanton kiel ilon, ne kiel celon.

Mi do konsilas al ĉiu propagandisto, ke li diru: „Ni estas internacia frataro. Ni do bezonas ilon por interkompreniĝi kun alilandaj skoltoj. Lernu do Esperanton. Ĝi ne estas malfacila kaj oni uzas ĝin en ĉiuj landoj.”

Kontraŭe, se ni diras, ke ĉiu skolto devas konsideri Esperanton kiel idealon, la plej bonaj skoltoj tute ne interesiĝos pri la afero.

Ni do ne parolu pri esperantista idealo, sed pri ilo, kiu taŭgas por interkompreniĝi kaj disvastigi skoltajn idealojn inter la diverslandaj gejunuloj.

Jean Texier, 278 Avenue Daumesnil, Parizo, Francujo.

RICEVITAJ ESPERANTAJOJ.

La Esperanto-Federacio de Danaj Altlernejoj kaj Studenta Esp. Klubo en Kopenhago eldonis la unuan n-ron de sia internacia studenta gazeto: „**La Studento**”. La gazeto estas presita, 12-paĝa. Adr.: Johs. Vesterland-Andersen, Bernstorffvej 78, Hellerup, Danujo.

Lago de Como, 10-paĝa, bele ilustrita faldprospekto. Krome 16-p. gvidlibro pri la restadstacioj kaj ĉefaj turismaj lokoj de la Lago de Como. Oni povas peti ambaŭ eldonojn de: Ente Provinciale Turismo, Como, Italujo.

Nürnberg, 6-paĝa ilustrita faldprospekto, kun urboplano. Oni povas peti ĝin de: Verkehrsverein, Nürnberg, US-zono, Germanujo.

Celo kaj Deklaro de la Principaro de la Socialista Partio de Granda Britujo. Esperantistoj, kiu deziras informojn skribu al: The Socialist Party of Great Britain, 52, High St., Clapham, London S.W. 4, Anglujo.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Bulgarujo: Zaprain Kambourof (22-j. gimnaziano) dez.kor.k.l.t.m., interŝ. p.m. kaj bildk. Adr.: Via Allexandrowska N 76, Burgas.

Boris Stojanov Ovĉarov, str.Kavala 35a, Burgas, dez.kor.k.l.t.m., interŝ. p.m., bildkartojn, fotojn k.t.p.

Ivan Petrov Mostrov, str.Troian 96, Burgas, (18-jara), dez.kor.k.l.t.m., interŝ. p.m., bildkartojn kaj artikolojn.

Francujo: S-ro P. Babin, Lycee P. Loti, Rochefort-sur-Mer, sendos poŝtkarton al ĉiu samideano (juna aŭ maljuna) kiu sendas unu al li.

Germanujo: 17-j. gimnaziano dez.kor. kun junuloj en la tuta mondo. Rudolf Glockner, Mannheim-Käfertal, Strassenheimerweg 47.

Hispanujo: Por propaganda ekspozicio en la XII-a Hispana Esp. Kongreso mi afable petas malsamajn glumarkojn. R. Molera, Moyá, Barna.

Maroko: S-ro J. L. Ballesteros (el Hispanujo) sciigas al siaj geamikoj ke lia nova adr. estas: Poste Restante, Rabat, Maroko. Li ĝoje ricevos leterojn.

Ni gratulas: Ges-rojn Koopmans-Schotanus, „Malgranda Paradizo”, Vosmaeraan 3, Hilversum (Ned.), al kiuj je la 26-a de junio naskiĝis filineto: Roelofke Maaike Benita.

Ges-rojn Aarse-Schreiber, Vechtstr. 161, Amsterdam-Z. (Ned.), al kiuj je la 2-a de julio naskiĝis filo: Simon Karl.

PERANTOJ KAJ KOTIZOJ DE „LA JUNA VIVO”.

Kiel ni jam klarigis en la koncerna artikolo en ĉi tiu n-ro, la kotizo de 1/9'51 estos 3.— guld. (aŭ egalvaloro) por abonantoj, aktivaj kaj subtenantaj TJO-anoj. Por familianoj ĝi restas 1.— guld. De 1/9 ne plu aperos parto el LJV kiel lerneja gazeto, sed tute alia, dukolora organo. La aspirantaj TJO-anoj kaj abonantoj je la 8-p. LJV trovos detalojn pri kotizo ktp. en la specimena septembra n-ro de tiu gazeto.

Al tiuj, kiuj por la jaro 1/7'51-1/7'52 jam pagis 2,50 guld. ni afable petas aldoni ankoraŭ 0,50 guld. plus 0,25 guld., ĝis 1/9'52.

De nun oni povas aliĝi je ĉiu dato. Oni pagu la kotizon ĉe la aliĝo, sed prefere ĝis septembro. Kiu do ekzemple aliĝas je la 1-a de decembro pagu sian kotizon ĝis la 1-a de septembro de la venonta jaro (2,25 guld.). Kiu aliĝas je la 1-a de marto pagu guld. 1,50 ĝis la 1-a de sept. Tio plisimpligos nian administradon.

Aŭstralio:	Fr. Halls, 59 Nepean Highway, Elsternwick S 4, Melbourne	§ 7.—
Aŭstrujoj:	Alois Hilkersberger, Landeck, Lötzweg 1, Tirol, Poŝtsparkonto 195356	§ 20.—
Belgujo:	Ph. Cullus, 13 rue Chopin, Anderlecht-Bruxelles, ĝironumero 806765	fr. 40.—
Britujo:	F-ino N. Rees, Derwydd, Seven Sisters, Nr. Neath, S. Wales	§ 6.—
Danujo:	Kaj Pedersen, Brønshøjvej 62, Brønshøj, Ĝironumero 73478	kr. 6.—
Finlando:	Eld. Vilho Setälä, Onentie, 23, Helsinki-kä	fmk 185.—
Francujo:	Roger Bizet, Wierre au Bois par Samar, P. d. C., ĝironumero Lille 182135 ...	fr. 280.—
Germanujo:	Günther Schaedel, München 22, Kaulbachstr. 61, ĝironumero München 92299	DM. 3.50
Hispanujo:	M. Montserrat, Strato Provenza 75, Barcelona	pes. 35.—
Italujo:	Prof. A. Camuffo, 4 Bart. d'Alviano 4, Trieste 402	L. 435
Jugoslavujo:	Kralj Drago, Rozna Dolina 6-22, Ljubljana	din. 40. .
Maroko:	Ben Sion Ohana, Rue de la Kashba 1, Marrakech, ĝironumero „Rabat” c/c 368.92	fr. 280.—
Polujo:	Benedict Palczynski, Reda k.Gdynia ...	zl. 3,20
Svedujo:	Esperanto-Förlagsföreningen, Fack 19071, Stockholm	kr. 4.10
Svisujo:	S-ro R. Keller, Kleinalbis 59, Zürich 45	Sv. Fr. 3.45
Usono:	E.A.N.A., 114 West 16th Str., New York II, N.Y.	dol. 1.—

La solvo de la ŝarado: Mi-lito.